La kubanoj ĝuos basbalan matĉon inter Kubo kaj Usono.



Estis informite ke la provincoj Pinar del Rio kaj Matanzas estos la sidejoj de la basbala matĉo inter Kubo kaj Usono kiuj prezentos teamojn de la nacia teamo universitata de tiu lando kaj Kubo.

La ludoj okazos ekde la 23-an de julio en la provinco Matanzas kaj finiĝos en Pinar del Rio la 27-an de la sama monato, laŭ konfirmis al la gazetaro Higinio Vélez, nacia direktoro de la kuba basbalo kiu argumentis ke tiuj sidejoj estis elektitaj kiel rekono al la teamoj de ambaŭ provincoj, vic-ĉampiono kaj ĉampiono respektive de la lasta nacia basbala matĉo.

Temas pri “selektado de la plej bonaj universitataj basballudantoj de Usono, junuloj tre bone preparitaj kaj simila al tiu kiu venkis kontraŭ la insulo pasintjare”.

El la sama fonto estis sciite pri la elliro de la lando, pere de la senskrupula malleĝa homtrafikado, de la iama ludisto de la teamo Industriales de la ĉefurbo, Yasmani Tomás.